

Theodor Storm,

Lunlumo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ripozas jen la mondo
En lumo de la lun’;
Kaj kia pac’ beata
ĝin ĉirkaŭtenas nun!

La vento nur susuras,
Apenaŭ movas sin,
En tiu milda brilo
Ekdormas je la fin’.

Kaj kio ne ekfloris
Dumtage sub la sun’,
Malfermas la kalikojn,
Odoras nokte nun.

Al tiu pac’ delonge
Ne kutimiĝis mi!
Amplena luno estu
en mia vivo vi!

*Traduko de la Germana poemo “Mondlicht” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-494-965 (2009-11-07 19:37:14)

Mi, Manfred Retzlaff, esperantigis tiun chi poemon en la 13/14a de Aprilo de 2002.